



ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX/14, p. schr. 75. — Redaktas Dr Stan. Kamarýt.

Komenco de oktobro signifas por ĉiu ĉeĥo kaj slovakoj rememoron ekstreme malĝojan kaj hontigan. Antaŭ dek jaroj invadis en nian landon laŭ ordono de Hitler germana soldataro kaj al ni estis laŭ Munĥena interkonsento malpermesite defendi nin. Ĉeĥaj enloĝantoj de la apudlimaj regionoj devis fuĝi, lasante ne sole domojn kaj kampojn, sed ĉiun ajn posedaĵon. Ni ĉiam kredis kaj kredas, ke la interkonsento en Munĥeno enigis ankaŭ francojn kaj anglojn en grandan danĝeron. Laŭ nia opinio kulpo de tiamaĵ angla kaj franca ĉefministroj konsistis en tio, ke ili cedis al mensogo kaj al intencata krimo. Toleri krimon signifas partopreni en ĝi. Ĉu Nürnbergaj procesoj kontraŭ militkrimuloj signifos estiĝon de konvinko, ke krima ordono ne estas plenumenda, ke obei ordonon por atakmilito estas krimo? Ĉu estiĝos konvinko, ke unu el signoj de faŝismo estas intenco konservi la pacon per ofero de la pli malforta? Ĉu la lasta milito instruis nin, ke krimo naskas krimon? — En tiama tempo de nia plej doloriga humiligo estis la rusoj, kiuj unusolaj estis proponantaj sin al helpo por ni. Ĉu estas mirige, ke ni ĉeĥoj kaj slovakoj plej firme fidas ĝuste al rusoj?

Překlady Miloše Lukáše z novořečtiny Tradukoj de Miloš Lukáš el la novgreka

Panajotis Sutsos (1809—1868):

JAKA JEST?

— Slavičku, ty ptáče malé,
o lásce jenž zpíváš stále,
po lesích se touláš všudy,
neviděls ji? — nešla tudy?

— — Těch tu přešlo dnes
i včera!
Jakž mám vědět, kdo je která?
Jistotu chceš? Tož mi oznam,
po čem ji tak nejspíš poznám.

— Velké, v mléce vykoupané
oči má, a žár v nich plane;
svěží, vonné rtíky její
růžnou červení se skvějí.
Klenuté má obočí,
vlásky plavé, do zlatova,
ňadra jako mramorová;
libujíc si v květné zdobě
chodí, jako páv když sobě
v hávu pestrém vykročí.

Viš teď vše, co třeba vědět.
Stačí ti to k poznání?
— — Však ji tamhle vidím sedět
u potoka pod strání!

— Už tam mířím v plesném
spěchu;
dlit až budu u své milky,
z myrtovi nás pro potěchu
milostnými obdar trylky!

Panajotis Sutsos (1809—1868):

PRISKRIBO

— Najtingalĉjo, birdo kara,
amkantisto senkompara,
ĉu en bosko vi hazarde
ne renkontis ŝin rigarde?

— — Kiel ŝin ektrovu oni?
Kiel trovi, sen ŝin koni?
Multaj tie vagas. Kia
estas distingilo ŝia?

— Okulparon ŝi posedas
grandan, ĝin per lakto knedas;
lipojn freŝajn — kun odoro
kaj kolor' de roza floro.
Ĉarmas ŝia brova ark',
bukloj kun nuanc' de oro,
brusto kvazaŭ el marmoro,
florojn ŝi orname prenas
kaj parade ŝi promenas
kiel pavo en la park'.

Ĉu vi ŝin do ie vidis?
Ĉion diris mi laŭ ver'.
— — Ŝin mi vidis: Ĵus ŝi sidis
tie apud la river'!

— Goje mi al ŝi rapidos;
restu en mirteĵ' ĉi-loke,
kaj dum apud ŝi mi sidos,
nin regalu amo-voke!

Dionysios Solomos (1798—1857):

SEN

1. Sen svůj chci ti vyličiti,
děvuško má spanilá;
zdálo se mi, noc že byla,
tys ji se mnou trávila.
2. Procházeli jsme se spolu
utěšenou zahradou,
dívala ses po hvězdičkách,
na nebi jak jasně žhnou.
3. A já pravil: kterápak z vás
— hvězdičky, tož řekněte! —
září stejně, jako září
očka mého děvčete?
4. Řcete, zdu tak skvěle vlásky
která z vás kdy viděla,
takou ručku, takou nožku,
zjev tak hodný anděla!
5. Kdo tu lůznou postat zhlédne,
vědět jen to by chtěl,
jak prý mohl tento anděl
zavítat k nám bez křídel.
6. Při každičkém polibení,
jež jsi vtiskla na můj ret,
na růžových keřích vůkol
rozpučel se nový květ.
7. Pučely tak po noc celou,
až nás stihla ranni zář,
znenadáni dopadajíc
na pobledlou naši tvář.
8. To byl, drahoušku, ten sen můj;
záleží teď na tobě,
chceš-li tohle všechno prožít
ve skutečné podobě.

Dionysios Solomos (1798—1857):

LA SONGŌ

1. Ho, aŭskultu songon mian,
mia belo kaj trezor':
estis nokto, kaj ni kune
ĝin pasigis, kor' ĉe kor'.
2. Super ni sur firmamento
lumis treme steloj mil;
dum ni en ĝarden' promenis,
ĉarmis vin ilia bril'.
3. Mi demandis: Ho, steletoj,
ĉu en via granda ar'
estas unu, kiu brilas
kiel ŝia okulpar'?
4. Ĉu ekzistas aliloke
tiaj bukloj? — diru nur! —
tia anĝeleca mano
aŭ piedo aŭ statur'?
5. Ĉiu miras ĉe l' ekvido
de ĉi tiu korpa bel':
krom ke mankas la flugiloj,
jen verdire ja anĝel'!
6. Kiomfoje min vi kisis,
ĉiam ekburĝonis tuj
nova freŝe ruĝa floro
ĉirkaŭ ni sur la rozuj'.
7. Kaj burĝonis ili daŭre
nokton tutan pli kaj plu,
ĝis tagiĝa helo falis
sur vizaĝojn de ni du.
8. Jen la songo. Nun dependas,
karulin', de via dec',
ĉu vi volas viaflanke
sperti ĝin en realec'.

Jeorĝios Zalokostas (1805—1858):

PASTÝŘČIN POLIBEK

- Já pastýřku jsem miloval; tak nyl jsem po ni v touze,
že nelze to ni povědět —
a to mi bylo deset let,
já piskletem byl pouze.
- A tu mě ona políbí a v náruč' svou mě hálí:
„Ne, chlapečku, těch řečí nech,
vždyť na milostný žár a vzdech
jsi ještě příliš malý!“
- Ji děl jsem, když jsme seděli kdys na rozkvetlé nivě:
„Ó Marčo, chtěj mi sluchu přát,
ó Marčo zlatá, mám tě rád
tak horoucně, tak divě!“
- Teď — dospěv — po ni prahnu dál... Leč ona volná není
a nechce na mne mysletí...
Mně nezmizí však z paměti
to její polibení.

Jeorĝios Zalokostas (1805—1858):

LA KISO DE LA PAŖTISTINO

- Ekamis paŝtistinon mi; por mi ŝi estas kara,
pli kara ol plej brila gem' —
sed tiam estis ja mi mem
knabeto nur dekjara.
- Kaj ŝi subite kisis min en ĉirkaŭpreno pura:
„Ne, ne, etulo, por la am',
por ĝemoj kaj pasia flam'
ne estas vi matura!“
- Kaj kiam en floranta val' ni sidis herbej-meze,
mi diris: „Manjo, aŭdu min,
mi, Manjo, amas vin sen fin',
mi amas vin freneze!“
- Plenkreskis mi kaj ardas plu... Trovin'te jam alian,
ŝi min kondamnis al forges'...
Sed mi — mi daŭre kaj sen ĉes'
memoras kison ŝian.

Marie Pujmanová: Mobilizo en septembro 1938

El radio sonis la ĉarma soneto, harpaj agordoj, kiuj konstruas Vyšehradon. Depost longe ili ensuĉis angorojn de la monato septembro.

»Restu ĉiuj ĉe viaj aparatoj!«

Ĉiuj el ĉeĥoj, kiuj tiam aŭskultadis, kaj ili aŭskultadis ĉiuj, ĝis la morto memoros tiun enkondukan frazon. Ĝi diradis nenion, pra-nenion. Sed ĝi estis ŝarĝita de alta tensio.

»Restu ĉiuj ĉe viaj aparatoj. Ni havas por vi gravan sciigon.«

Kaj ree oni ludis soldatmarŝojn.

Kiam Hitler nin streĉas sur torturilo — kial tion faras eĉ nia radio laŭ li? Neniun muzikon, ni volas difinajn vortojn! Neniu dum tiuj tagoj emis toleri muzikon. Kvankam Ella bone sciis, kion ĝi signifas, kiam oni ludas soldatmarŝojn.

Ŝi estis iam konfesantino de la paco per sia tuta esteco. Ŝi ne oratoris pri tio, ne verkadis, ŝi tion simple vivis. Ŝi havis amatan edzon, infanojn, nepon. Ŝia destino estis tiu de la virino, ŝi ne deziris iun alian. Ŝi ofte sentis tre forte, kiom belega estas la ordinara vivo en la amo — malgraŭ ĉiuj penoj, kiujn ni iam renkontas. El ŝia sino eliris vivaj kreitaĵoj, al ŝiaj manoj estis konfiditaj etaj infanoj, tie ĉi antaŭ ŝiaj okuloj disvolvigadis tiu diskreta miraklo, per kiu transformiĝas senkulpuleto, apogata sur kvar iriloj, al floranĉa matura homo. Al filo soldato. Kaj nun li marŝos laŭ tiu muziko, ho muziko — se vi preferus tion diri jam!

»Restu ĉe viaj aparatoj!«

Ŝi ne estis juna, ŝi sciis, kio estas milito. Tri jarojn estis la edzo, Gamzo, en militfronto. Kaj murdan mekanismon kaj koron en tenaĵlo, kiam ne venas la poŝtkarto el militejo — denove ŝi devas travivadi tion ĉe filo?

»Prezidento de la Respubliko, kiel supera komandanto de la ĉeĥoslovakaj defendfortoj, deklaras ĝeneralan mobilizon.«

»Dank' al Dio,« mallaŭte eldiris Nella; kaj tuj ektimegis, kion ŝi parolas. Kvazaŭ ŝi per tio enigis Stanĉjon en danĝeron. Ambaŭ gepatroj ekstaris kaj iris al la filo.

»Stanĉjo,« komencis la patrino singardeme, per tia voĉkoloro, per kiu ŝi lin vekadis matene en bibliotekon. »Stanĉjo.«

»Mobilizo? Bone. Mi jam iras,« ekrespondis Stanĉjo el sia verkado ankaŭ per voĉo de vekiganta homo. Li jetis plumon kaj cigaredon for, metis punktitan ŝtonon el Neĥleby, kiun li uzadis de knabaj jaroj kiel pezilon, sur sian manuskripton, kaj ekkuris al pordo.

Gamzo ripetis al li per milda voĉo lokon de lia garnizono. Nella kun manoj malvarmigintaj pro ekscitiĝo iris serĉi aĵojn por la filo. Antonĉjo, amerika civitano, ne estis devigita iri militi kaj kvazaŭ li hontus pro tio. Nepre, nepre li volis helpadi al Nella. Stanislao ilin ambaŭ haltigis.

»Nenio!« diras li venke kiel malgranda knabo, kiu superatutis la plenkreskulojn. »Mi jam estas pakinta. Jen.« Li malfermis ŝrankon kaj levis el ĝi enpakitan dorsosakon.

Radio apude rediradis mobiliz-dekreton slovak-lingve. »Tia rapideco! Stanĉjo, ĉu ĝi estas ebla?«

»Jam hieraŭ,« konfesis Stanislao. »Ĉiam min malkvietigadis penso, ke mi ne sufiĉos rapide paki, se ĝi venos. Tial mi tion finfaris tuj kaj poste mi povis almenaŭ verki.«

Li stariĝis dorse al la tablo kaj ekprenis la unuan sakrimenon. Sed ja la familio!

Atendu, ion por manĝi! Agu laŭ saĝo, oni ja tion deklaris. Prenu tiun ĵerzon, ĝi utilis. Hidrofilan gazon! Mi tuj revenos el konsultejo. Antonĉjo ŝtopis al li en surbrustan poŝon cigaredojn. Koron ili estus dividintaj kun li. Kaj tiu ĉasado de detalajoj forportadis patoson de adiaŭado. Neniu havis momenton ekpensi, ke Stanĉjo eble jam ne revenos.

»Paĉjo, mi petas vin,« eldiris li tre rapide, kiam ili kun patro por minuto restis solaj — rapide, ĉar li hontis. »Pardonu al mi — tiam tiun stultajon kun somnifeno!«*)

Neniam antaŭe eĉ vorto pri tio estis dirita inter patro kaj filo.

Gamzo lin al si strikte aliris kaj forte alpremis.

»Silentu, vi estas mia bubo,« kaj ekpalpis amplene kaj mallerte lian hararon. Stanislao rimarkis kun surprizego unuan fojon en sia vivo, ke en okuloj de la patro staras larmoj.

Antonĉjo helpis al li meti sakon sur dorson kaj Stanĉjo, tiu kun knabinnazo kaj brilantaj haretoj, ekstaris antaŭ la patrino. Ŝi ne ploris. Ŝi ridetis al li, ŝi alridetis, por ne fari al li pezan koron, ĝi estis terure vidi tiun rideton. Ĝi estis la militrideto de Nella. Stanĉjo ne konis ĝin; tiam li estis malgranda, dum la mond-milito. Kaj kiam Gamzo estis en Leipzig, tiam ree Stanislao havis okulojn por neniu en la hejmo.

Helenjo sulkigis frunton kiel ĉiam, kiam ŝi superregis emociion. Barbara unusola inter ili ekploris kaj tuje volis forgesigi tion, ekparolante:

»Vi havas inkon surfingre,« vokis ŝi post Stanĉjo, kiam li rapide premis ŝian manon. »Ke vi ne havu en soldatejo komplikajojn pro tio.«

Barbara memoris ankaŭ la malnovan Aŭstrion.

Stanĉjon ĝi ridigis. Li ekridis per rido de junaj homoj kaj tiel li elpaŝis el la hejmo.

Patro kaj patrino iris kun li tra ĝardeneto, el la pordo, parton sur la strato. Sed ili ne estus povintaj tiom rapidi. La filo malaperis al ili en la mallumo.

Stanislao havis feliĉon. Antaŭ remizo li kaptis aŭtodroŝkon, ensaltis, nomis stacidomon, kaj ili veturis. Ĉe la Pulvoponto gestis al ili viro kun kofreto. Tuj kiam li estis enirinta, kvazaŭ per lia paŝo sur ŝtupeton estingiĝis la lumoj. En Stanĉjo estiĝis sento, ke estis tratanĉita la tempo, kiel en la novjara nokto, kiam li estis juna. Tiel kvazaŭ li saltus de ponteto en akvon, de unu elemento en la alian — kaj ili veturis.

*) Temas pri provo de memmortigo de Stanĉjo (rim. de trad.)

Pasinteco en la intima lamporondo, kiam apartenis al li rajto decidi, finiĝis, kaj nun jam Stanislao ne apartenas al si en tio, kolose malluma, kio nun estos kaj kio ruliĝas. Militaj ŝarĝaŭtoj rapidis kontraŭ ili eksteren el la urbo sur la Chotek-ŝoseo, oni ne sciis: Ĉu veturigas kanonojn, ĉu homojn? La soldatoj en mallumo nek ekkriadis nek kantis, ĉio kuniĝadis en unu armilan movon el metala kaj homa materio, al homo ŝajnis: Jen la milito veturas. Ĉu Prahano bombardos germanaj aviadiloj por ke ili difektu nian mobilizon? Oni tion tamen sciis. Sed tio ne estis zorgo de Stanĉjo, lia zorgo estis Wilson-stacidomo. Sola, li verŝajne timus; sed estis tia tre malofta konsolo, ke li ne apartenas al si mem. Kaj ĉio okazadis kvazaŭ sub akvonivelo, tiuj, kiuj iradis kaj veturadis, tute ne parolis, kvazaŭ ili turnadus kompletan energion al rapidado. Kiel kreskis la tempo kaj Stanislao veturis pli profunden en la urbon, paŝantoj kun kofretoj kaj dorsosakoj multiĝadis kiel en

sonĝo. Ampleksaj mallumaj domblokoj eĉ displitiĝinta parkarbaro, en mallumo ekzotikaspekta, kvazaŭ naskus ĉiujn virojn kun kofretoj. Jam migris da ili fluaĵoj, kiam la taksidroŝko alveturis antaŭ Wilson-stacidomo, kaj anstataŭ unu Stanĉjo eliris tri rekrutoj.

El Strěšovice ĝi estas bela vojaĝparto.

»Kiom ĝi kostas?«

Droŝkisto mangestis.

»Nenion! Hodiaŭ mi veturas senpage.«

Kaj li turnis, kaj kunveturigadis pluajn.

Antaŭ Stanislao eniradis en la plenplenan stacidomon du fraŭloj en surtutoj sur grasumitaj laborvestaĵoj, kiel ili estis foririntaj el la nokta laborsekcio.

Ĉu ja estas eble ne venki kun tia ĉi juvela nacio, ekmeditis Stanĉjo. Ni neniam ŝatis soldatparadojn. Ne, ni ne ludis soldatmaniere. Sed anstataŭ tio, se ĝi iĝas grava — — —

(El la libro „Ludo per fajro“, aperinta 1948 ĉe Fr. Bořový, tradukis S. K.)

SCIIGOJ

34-a Universala Kongreso de Esperanto en Bournemouth, 6—13 aŭgusto 1949.

Loka Kongresa Komitato: Prezidanto: J. W. Chambers; ĝenerala sekretario: C. C. Goldsmith; konstanta sekretario: O. T. Nicolaisen.

Adreso por leteroj: 34-a Universala Kongreso de Esperanto, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglio.

Kongreskotizoj:	ĝis		poste
	31. 12. 48	31. 3. 49	
Kongresano	ŝil. 30	35	40
Edzo aŭ edzino de kongresano	ŝil. 15	17.50	20
Junul(in)o ne pli ol 20-jara	ŝil. 12.50	15	20

Pagoj: Estas akceptataj

a) ĉiuj pagiloj ŝanĝeblaj en bankoj. Atentu: ne sendu monbiletojn en letero!

b) Internaciaj poŝtmandatoj, ĉekoj, k. t. p., pageblaj al Universala Esperanto-Asocio.

c) Oni pagu al iu banko petante, ke la sumo estu sendota al Barclays Bank Ltd., Rickmansworth, konto de Universala Esperanto-Asocio, kaj kun sciigo pri la sendinto.

Kiel pagon por la kongreskotizo ni ne akceptas poŝtmarkojn aŭ varojn, sed ni povas akcepti ĝuste stampitajn internaciajn respondkuponojn laŭ la tarifo 4 rpk. = 1 ŝil.

Loĝejoj: Bonaj loĝejoj estos haveblaj po £ 5, 6, 7, 8, kaj pli altaj sumoj por la semajno. Tiuj prezoj enhavas la koston de ĉiuj manĝoj dum la semajno, sed ne la trinkmonon. Ni esperas ankaŭ aranĝi pri malmultekostaj loĝejoj kaj tendaro. Notu, ke pro la specialaj cirkonstancoj en Bournemouth (feria urbo) ni kutime povos akcepti mendojn por restado nur de sabato ĝis sabato, t. e. por unu, aŭ du, aŭ pli da semajnoj.

Danubregiona Kontakta Komitato estas organo, en kiu kunlaboras reprezentantoj de la landaj asocioj Bulgara, Jugoslava, Rumana, Aŭstria, Hungara, Ĉeĥoslovaka, Pollanda. Ĝi celas ebligi interŝanĝon de spertoj kaj krei eblecon de komuna kunlaboro por Esperanto. Kiel unuan taskon ĝi rigardas klopodi, por ke demokratia sinteno ĝeneraligi en esperantistaj organizoj kaj vivo, ke etikaj demokratiaj idealoj validu inter esperantistoj, ke neŭtraleco de nia movado ne signifnu neŭtralecon al krimo. Plue la Komitato klopodos pri faciligoj de pagoj por esperantistaj servoj inter la ŝtatoj de popola demokratio reciproke kaj inter UEA kaj pri aliaj faciligoj, helpantaj al progresado de esperantisma ideo. Nia Asocio aliĝis al DKK per decido de la sia Komitato la 8-an de septembro 1948. Gvido de DKK estas en Sofia, Tri Uŝi 15 ĉe la Bulgara Esperanto-Asocio, ĉi ne estas aparta organizaĵo.

Jiří Mahen:

INSTRUO DE BIBLIAMANTO

*Ekmutis sonoriloj, foras vortoj,
Sed haltas ni ankoraŭ super io,
Se ja atestas mond' pri grandaj sortoj,
En kor' dormetas taske nova scio.*

*Fortempe oni al ni memorigis
Ja sen kompren' de juna menso kion?
Nu, se ni super ĉio manon ŝvingis:
Misteron havas temp' kaj eĉ Mesion.*

*Por granda tasko estas ni malmultaj,
El kompetentaj elektita unu —
Ne estas faktoj do fatal-rezultaj,
Ĉi ŝajna vero vin ne trompe punu.*

*Per logo antaŭiri por rikolto
Aliajn kaj ĝin poste firme teni —
Vi devas maturiĝi en hom-rondo
Kaj por ĉi rondo ĉiam brave peni.*

*Interne kiam flamas vi pro tristo,
Jen Mastro foje al vi venas ree,
Sukcesas tiam ĉio sen rezisto,
Car benas Li vin, sian ilon kree.*

*Kaj staras la popol', sen laŭ' atendas,
Al vi espere supren rigardanta,
Eĉ nokta pez' minace se falpendas,
Li scias, estos ĝi lin respondanta.*

LINGVO

Jak překládati pro zpěv?

Jest těžko vysvětlitelné, proč esperantisté-začátečníci zkoušejí obyčejně svoji dovednost hned na překládání básní a národních písní, tudíž na nejobtížnějším poli tvůrčím. Ještě neovládají dobře prózu, ale již vstupují na nejvyšší místa Parnasu, skládají básně. Není to však tak snadné a ještě nesnadnější jest dosíci, aby překlad odpovídal také hudbě, když překládáme písně nebo arie. Hudba má totiž svůj vlastní rytmus a přízvuk, který se musí shodovati s přízvukem v textu. Jest pravdou, že i naši přední skladatelé hudební chybovali proti české deklamaci a přízvuku. Tím obtížnější jest pro nehudebníka překládati písně a arie tak, aby se tu neprohřešil.

Na přání vyslovené Svazem esperantistů ČSR uvolil se podepsaný prohlédnouti a posouditi po těchto stránkách překlady textů zhudebněných a sděliti autorům svůj názor a své připomínky, pokud mu zašlou svoje esperantské texty pro zpěv k posouzení. Jedná se také o to, aby tato překladatelská činnost na poli hudebním byla soustředěna pro evidenci o tom, co již bylo přeloženo, na které originální esperantské texty bylo již komponováno, a tak dále.

Asi před 28 lety vydal časopis „La Progreso“ v Plzni velmi dobrý pschod „Nur antaŭen!“ (Esperantista marŝo dediĉita al la XIII. Esperantista Kongreso, komponita de Jos. Horák, Plzeň, al la vortoj de Dro St. Schulhof, Pardubice.) Celá báseň Dra Schulhofa jest v esperantu, v němž byla originálně napsána, správně deklamována. Počáteční slova však hudební skladatel (nikoli autor) nesprávně hudebně akcentuje: antaŭen místo antaŭen. Tomu by se dalo snadno odpomoci, kdyby na prvou dobu taktu dal skladatel dvě osminové noty a na druhou dobu jednu čtvrtovou notu. Tím by také hudební přízvuk přešel na přízvucnou druhou dobu a melodický rytmus by se nijak neporušil, takže hudební přízvuk by souhlasil s jazykovým.

(. . . — . . . — místo — . . . — . . . —).
Známý jest výrok světového dirigenta, že v hudbě jest hlavní věcí předně rytmus, za druhé rytmus a za třetí rytmus. To platí však nejen o hudbě, nýbrž i o každém jazyku. Tu jest pak hlavním činitelem přízvuk. Tomu jest tak i v esperantu. Zamenhof byl si toho ve své genialitě dobře vědom a proto v úplné gramatice esperanta mezi 16 pravidly nalézáme pod č. 10. větu: „La akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo.“ Jest to podobné pravidlo jako v polštině a převážně i v italštině. Zapněte si v radiu italskou stanici a poznáte, jak hlasatelé výrazně akcentují a jak jest tato řeč libozvučná. Jest to řeč původu románského, jako z větších částí esperanto, a proto i ono působí tak libým dojmem při správné deklamaci.

Báseň a píseň jest nejvyšším útwarem projevu každého jazyka. A esperanto nemusí se obávat konkurence s přirozenými jazyky v tomto směru, neboť se vyrovná nejhudebnějším jazykům živým, jakými jsou italština a španělština. Velmi poučný jest v tomto směru v 2. čísle našeho listu úvodní článek „Verše v esperantu“ od Dra Stan. Kamarýta, který tu poukazuje na přednosti esperanta proti návrhu Basic English. V témže čísle jest i několik básní originálních a přeložených. Jest tu přeložena Hálkova báseň „Kdo v zlaté struny zahrát zná“. Jest rytmicky i přízvucně zcela správná. Avšak proti originálu vykazuje v každém verši o slabiku více, takže není možno na tento jinak správný a výstižný překlad zpívat Smetanovo zhudebnění českého originálu z „Večerních písní“. Naproti tomu překlad národní písně „Hořela lípa“ v témže čísle uveřejněný bude se zpívat velmi dobře. Tamže uvedená originální báseň „Amara rerigardo“ má charakter jambický, a přece třetí sloka (vers 2.) snad by mohla rytmicky lépe zníti: „ĉi tie taksis en ĉi tiu mondo“ místo „taksis . . .“

Jak nepřirozeně ba až komicky se jeví nesprávné použití přízvuku v písní, vysvitne na př., když bychom v esperantské hymně „La espero“ hned na počátku vynesli člen „la“ a zpívali k notám melodie o tuto slabiku méně: En mondon venis nova sento. Jak by naše ucho bylo uráženo! Jest to něco podobného, jako když vojáci ve vojenském vysílání rozhlasu dostávají za úkol zpívat na př. „Sil jsem proso“ na slova „Nešťastný ša-

fátův dvoreček“ a pod. Z těchto, snad drastických, ukázek jest nejlépe patrna důležitost souladu rytmu slovního a hudebního.

V hudbě jest přízvuk rozdílný dle toho, zda se jedná o takt lichý (na př. valčíkový) či sudý (na př. polkový). Zpěvák musí míti požitky nejen z krásné melodie, nýbrž i z přiléhavého a zpěvného textu. Ovšem i pro posluchače jest příjemnější lahodná shoda a harmonie textu s hudbou a bylo by tu největší estetickou překážkou, kdyby rytmus hudební se nesrovnával s hudbou řeči.

Ježto podepsaný jest stoupencem esperanta již přes 40 roků a pěstovatelem hudby a zpěvu již přes 50 roků, domnívá se, že by mohl svých zkušeností použití ve prospěch našich překladatelů a básníků textů, jež souvisí se zpěvem, a jest ochoten býti nápomocen radou ku zdaru esperantské hudební tvorby. Jest třeba jen k zásilce připojit dostatečné poštovní známky na odpověď.

JUDr Josef Fousek, Přelouč.

19. úkol k překladu

Nerozuměla sama, co se s ní vlastně stalo. Ta příhoda s Andrejem — vždyť je to k smíchu. Kolik takových věcí je zapomenuto od jednoho úplňku do druhého. Slováček se sice trochu vzpouzel, když měl jít, pak prosil a plakal, a na konec se podrobil se zatatými rty, s postojem trochu záhadným, který už prozrazoval jakýsi úmysl. — Jiřina stála u něho, když si balil svých pět švestek, a vyprovázela ho očima ze vrat, a teprve potom si uvědomila s jistým překvapením, že jí záleží na tom, aby ho potýrala. Také se nemohla ubránit, aby se jí nevracely, vhod i nevhod, některé vzpomínky na onu plesovou noc. Podivné odhodlání, které jí prolulo v sále plném světla uprostřed tanečního rytmu — ačkoli nejprve vůbec nemyslíla na Andreje — ono zvláštní opojení, které jí ponoukalo, aby porušila rovnováhu tak vratkou, a pyšný soucit, když uviděla tragickou masku Jana Šimona . . . Svého snoubence úplně přehlédla, a byla by ho nad schody málem uhodila do tváře, když se tak samozřejmě chystal jet s ní domů. Jak se nafoukl a jak se hloupě usmíval, když mu řekla, že ho už nechce vidět! Ta mužská ješitnost! Jak by mohl někdo odmítnout jeho, inženýra Vojtěcha Vydru, syna poslance Vydry z Ořechova . . . (Jan Čep, Hranice stínu, str. 153.)

Předkládáme tentokrát text z beletrie. Bylo ho použito pro písemnou zkoušku u naší zkušební komise v Doksech. Přes poměrnou snadnost je v něm několik míst, jež si zaslouží přemýšlení, aby se esperantským překladem předalo plně to, co autor chtěl říci. Překlady prosíme do 30. října.

ESPERANTISTA VIVO

Josef Socha, direktoro e. p., en Litovel (nask. 9. VII. 1872) konas Esperanton de la jaro 1893. En „Lingvo Internacia“ 1898 aperis lia traduko „La provizoro“, en 1897 lia „Letero el Aŭstrujo“ pri vizito de prof. Avilov el Tiflis kaj traduko „En la budoaro“. La maljuna, daŭre vigla samideano estu salutita elkore!

Edziĝo. Alois Grebeň kaj Věra Rybářová en Liberec edziĝis. Ili akceptu bondezirojn samideanajn.

Naskiĝo. Al s-a familio de V. Dušek en Hradec Král. naskiĝis la 29. VIII. filo Zdeněk. Gratulon sinceran!

Mortis Libuše Starchová - Hartmanová, instruistino en Praha, la 9-an de junio. Ŝi estis kunfondintino kaj komitatanino de Rondeto de Esperantistinoj, ĉiam afabla kunlaborantino en tiu agadsfero. Meritas esti ne forgesata.

NI LEGIS

Profesiaj vortoj en Plena Vortaro. Ni ofte sentas mankon de Esperantovortoj por fakaj esprimoj. Sed ĉu ni ĉiuj konas nian terminaron, ĉerpeblan el P. V.? Por ni tio ne estas kompleta terminaro, tamen pri la ĝusto de tiuj difinoj malmultaj kverelos kaj tiu argumento valoras. — Ni represas tiujn liniojn el organo de grafikaj gelaboristoj tutmonde „Informilo de IGEL“ el septembro kun esprimo de nia plena konsento. Komencas svarmi diversaj „proponoj de fakvortaro“, kiujn verkas bonuloj, nesciantaj bone terminojn en Plena Vortaro. Tiaj verkaĵoj kaŭzas sole haoson. Dua kondiĉo per taŭgeco de fak-esprimo estas, ke ĝi sen grava kaŭzo ne tro diferencu de internacia formo de la vorto uzata por la nocio en la ĉefaj mondlingvoj.

Ekzistismo estas nova filozofia skolo, nun tre laŭmoda, kiu bazas sur aserto, ke ekzisto antaŭas esencon. „Sennaciulo“ publikigas pri ĝi serion de artikoloj sub titolo „ekzistadismo“. Ni pensas, ke sufikso -ad- estas tie ĉi superflua, ĉar ideo de daŭreco estas necese entenata en ideo de ekzisto.

Du anglaj lingvoj? Ni legas en Svobodné slovo (27. VIII. 1948), ke la filmo „Olimpiaj ludoj, gloro de sporto“ estos farita en du versioj anglalingvaj, unu en la klasika por Britlando kaj kolonioj, la dua en la amerika por Usono. Por esperantistoj ĝi estas interesa dokumento, ke eĉ la angla lingvo ne estas tiom universala, kiel oni iam emas supozii.

La vero pri Ĉeĥoslovakio titolas artikolo de Rudolf Burda el Plzeň (el majo 1948) priskribanta en La Esperantista Laboristo el jul.—aŭg. politikajn okazintaĵojn en nia lando dum februaro. La artikolo finas per konstato, ke la 30-an de majo okazos parlamentaj balotoj, ke la popolo aplaudos la novan politikon, ĉar ĝis nun ĉiuj ĉeĥoslovakoj entuziasme laboras.

Muziko de estonto por Eŭropo. Ekzistas 9 pasaĝeraj aerservoj en Nov-Zelando, inter ili la linio Wellington—Blenheim estas priservata 3-foje tage, Wellington—Nelson 6-foje tage. (Interligilo, marto/aprilo 1948.) (O. G.)

Pentekosta jarkunveno de la Sveda Esperanto-Federacio kaj de la Sveda Laborista Esperanto-Asocio kunvenigis en Stockholm ĉirkaŭ 200 partoprenantojn. Ankaŭ en Svedlando estas manko de papero, tial estis decidite, ke Arbetar Esperantisten aperados sole dumonate (Barnhusgatan 8, Stockholm).

Internacia Komunista Frakcio ĉe SAT estis restarigita dum la Aarhusa kongreso. La celo estas propagandi Esperanton en la 4-a Internacio, kies esperantistaj membroj grupiĝas en ĝi. La nuna situacio estas favora al kreskado de la partioj de la 4-a Internacio precipe en Usono kaj en Francio. Kotizo monata por korespondado kaj eventuale por bulneto 2 respondkuponoj. Sin turni al k-ino Betty Larsen, Taarnblaeservej 11, Kobenhavn, Danlando. (Sennaciulo, junio.)

La Eŭropo-helpo de Centra Dana Esperantista Ligo enpezis en pasinta jaro 2658 danajn kronojn kaj sendis pakajojn al Hungario, Aŭstrio, Finnlando, Francio. (Laŭ raporto en ĝia jarkunveno en Aarhus dum pentekosto en Dansk Esperanto-Blad, junio.)

Centra Dana Esperantista Ligo (fondita 1908) havis la 1. V. 1948 36 klubojn kun 916 membroj kaj 162 izolulojn, entute 1078 membrojn. (Dansk E-Blad, junio.)

Tutmonda Esperantista Journalista Asocio aperigas bulneton ciklostilitan sub titolo TEJA. Ĝi havas jam ĉirkaŭ cent membrojn. Adreso de sekretario: Värmlandsgatan 10, Göteborg, Svedio. Ĝiaj aktivaj membroj estas ekskluzive profesiaj ĵurnalistoj.

Teknikan sekcion havas Sveda Esperanto-federacio. La sekcio havas 15 membrojn, el kiuj 8 apartenas al la elektra fako. El troveblaj fakvortaroj ĝi kolektas teknikajn terminojn sur kartoj. Ĝis nun ĝia kolekto ampleksas 5000 terminojn, el kiuj duono estas elektroteknikaj. En estraro estas tri inĝenieroj Alexanderson, Pehrsson kaj Wästfelt. (Svenska E-Tidningen, junio.)

Pri demokratio verkis traktaton en 6 ĉapitroj Emilo Gasse en Heroldo. Li emfazas el demokratiaj iloj precipe referendumon. La normokrea potenco de registaro kontraŭas laŭ li al demokratio ideo, eĉ la normokrea potenco de parlamento, elektita kiel ajn, difektas popolvolon. La re-

gistaro devus havi sole administran povon efektivigante per ĝi la normojn aprobitajn de referendumoj. — La pensmaniero de konata pensulo estas tre impresa. Sed li permesu al ni diri la dubon pri lia aserto, ke la ministroj precipe atentus siajn proprajn profitojn. Ne kredu tion! En multaj homoj daŭre bolas fajro helpi al la ceteraj, kaj precipe ankaŭ regante ilin. Tragika trajto en la politiko estas (miaopinie), ke estas malfacile scii, kio utilas al la homoj. Kaj ke volonte la homoj kredas, ke povas estiĝi paradizo sur la tero. Tiun naŭvagon kredas la gvidantoj kaj la gvidatoj same facile. Kaj eĉ por referendumo, bedaŭrinde, lasos sin persvadi multaj ĉu de friponoj, ĉu de frenezuloj, ke paradizo estas ebla. Mi pensas, ke sola espero estas en daŭra kaj ĉiama edukado al kredo, ke mirakloj neniam okazos. Nek materialismo nek spirituelismo kreos paradizon, sed per eksperimentado oni tute certe povas plibonigi staton de la mondo. Eksperimenti pri la societo, por tio aŭdaco tre rara estas bezona. Manko de kuraĝo estas unu el kaŭzoj de tro malrapida progreso en homaj rilatoj. Oni preferas prediki ideojn pri mirakla savo, filiasmajn fantaziojn, anstataŭ insisti pri provoj de novaj aranĝoj.

Esperanto-pionirino en Ĉeĥoslovakio estas titolita artikolo de Einar Adamson en Svenska Esperanto-Tidningen el junio, priskribanta agadon de Julie Šupichová kaj reprensanta ŝian bildon. Ni ripetu salutojn al ŝi direktajn de la sveda aŭtoro, kiu korespondas kun ŝi depost jaro 1911.

Přilohy. K tomuto číslu přikládáme dvě přílohy: nový informační leták o organizaci esperantského hnutí, zvláště v Československu, a znovu tiskopis prohlášení k akci UNO. — Obsah letáku doporučujeme i vaši pozornosti, neboť obsahuje všechny nejdůležitější informace, na které jsme i starými členy dotazováni. Novému zájemci dá odpověď na všechny otázky nejčastěji se vyskytující. Objednejte zejména pro účastníky svých kursů. Zasiláme obratem, zdarma. — Akce UNO končí 31. prosince t. r. Prosíme Vás, aby každý vrátil spolu tento jediný výtisk podepsaný. Další výtisky zašleme na požádání.

KORESPONDI DEZIRAS

Claude Feneru, 54, Rue d'Ypres, Menin, Belgio, 17-jara studento, dez. koresp. kun junulo, prefere studento, kaj intŝ. pk. ktp.

Jozefo Weber, Csorbatói str. 2 KE, Csepel, Hungario, 19-jara, deziras koresp. kun ĉeĥoslovaka esperantistino.

Karlo Kertész, Király Erdő Str. 126, Csepel, Hungario, 20-jara seruristo, deziras korespondi kun ĉeĥoslovaka komunisto aŭ -ino.

Peter Pružinec, Nováky 224, Slovakio, ĈSR, 17-jara studento, skolto, dez. intŝ. pm. kaj il. pk. kun eksterlandanoj.

Nevidantaj esperantistoj, loĝantaj en blindula domo en Zagreb, deziras korespondi kun blinduloj per brajla skribo. Adreso: Dom slijepih, esperantska grupa, Zagreb, Radnička cesta 12, Jugoslavio.

Profesoro nevidanto deziras korespondi pri lingvistiko kun tutmondo per brajla kaj maŝina skriboj: Karlo Muhar, Zagreb, Višegradska 11, Jugoslavio.

Pri tekniko kaj aerodinamiko f-ino Fuks Marta, 22-jara, Zagreb III, Harambašičeva 19/I, Jugoslavio.

Pri diversaj temoj f-ino Adela Krámer, 18-jara, Zagreb I, Ilica 65, Jugoslavio.

La Nova Kristanismo, bazita sur la doktrino de sveda sciencisto kaj reformatoro Em. Swedenborg, enportas certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri la vera religio, bazita sur la Biblio kaj ĝia interna senco. Informas: Jan B. Vlach, Lužická 21, Praha XII.

Esperantista klubo en Hradec Králové anoncas al ĉiuj samideanoj, ke

ESPERANTISTA POŝKALENDARO

por jaro 1949 denove aperos. La kalendaro povas esti ekspedata post la 15-a de novembro. — Ĉiuj kluboj kaj izoluloj skribu tuj al Esperantista klubo en Hradec Králové, Zamenhofova 1010, kiom da ekzempleroj ili bezonos. Pro manko de papero la eldonnombro de poŝkalendaroj estos limigita.

LOKAJ INFORMOJ

Bánovce n. Bebr. — Unua kurso en tiu ĉi urbo okazis printempe 1948 gvidita de T. Schellberger, estro de muzik-lernejo; 20 p. (E. S.)

Bojkovice. — La 7-an de aprilo finiĝis kun 20 p. kurso gvidita de Jan Tichoň. El ili 6 tuj aliĝis al EAĈSR.

Brno-Židenice. — Loka grupo de EAĈSR aranĝis la 24-an de aprilo amikan vesperon, kiun partoprenis 130 personoj. Vizitis ĝin samideanoj de la E-klubo en Brno, delegito de Tramista rondo kaj Jakubčák el sudorienta Slovakio. Kelkaj punktoj de la riĉega programo, elokvente direktata de Blažek: Himno „La Espero“, poemo „Nur antaŭen“ de dro Schulhof, rusa romano „Mi amis vin“, kanto de Hašler „Filo de Jura“, esperantigita kaj kantita de Jakubec. Krome kontribuis al la programo per kanto, ludo kaj deklamo A. kaj Z. Novotná, Schartlová, Wallachová, Cekr, Strejček, Zaccal. La kvinjara knabeto Stehlik legis unue poemon kaj poste kantis, akompanis lin piane 7-jara Veselý. La sukceso de la vespero antaŭdiras plej bonan esperon por estonta laboro. (Sereda)

Brno. — Programo de la kunvenoj en hotelo Passage (ĉiun mardon): 7. IX. Funebra kunveno por honorigi memoron de prezidento Dro Edv. Beneš. 14. IX. Ni rememoras la unuan prezidenton de Ĉeĥoslovaka respubliko T. G. Masaryk. 21. IX. Koncerta vespero: Fama operkantistino s-ano Marguerite Sautreuil el Perizo prezentis esperante, parte france la jenajn komponistojn: Richopin, Koehlin, Dupare, Charpentier, Massenet, Gounod, Hahn, Koquin, Puccini. Akompanis komponisto kaj kapelestro s-ano Vilibald Scheiber. 5. X. Vagado tra Tatroj (Jos. Friedrich). 12. X. Literatura vespero. 19. X. Vojoj al la paco (Václav Duroň). 26. X. Solena kunveno al la 30-a datreveno de ĉs. ŝtata sendependeco. 2. XI. Pri la sorto (Frant. Čížek). 9. XI. Oni ludas, kantas kaj prezentas... (R. Nečas). 16. XI. Tra Jizera-montaro (Jiří Kořínek). 23. XI. La revolucia jaro 1848 (Jaromír Hoffner). 30. XI. Ĉe Adriatiko (Marie Adamcová). 7. XII. Nikolo-festo. 14. XII. Soleno rememore al Dro L. L. Zamenhof. 21. XII. Film-vespero (Jan Pávek). 28. XII. Ĉeĥa pasinteco en verko de Alois Jirásek (Nelly Zitová). — Post la programo lasthoraj informoj pri la movado, konversacio, tradukado, societa vivo. Biblioteko, gazetaro disponebla. Memoru bone - mardo, tago de brna esperantistaro.

Chomutov. — La Loka grupo de EAĈSR ŝanĝis sian komitaton kaj dankas al la antaŭa pro farita laboro. Nova prez. Josef Vyskočil, sekret. Karel Mucha, Palackého 1018/3, Chomutov. Depost 1-a de oktobro 1947 kreskis la membronombro al 40. Daŭras 2 kursoj: por komencantoj kun 10 p., por progresintoj kun 15 p. En la klubo kolektiĝis grupo amuza, kultura kaj propaganda, kiu komune kun la Asocio de ĉefia junularo preparas E-an vesperon en Chomutov. La klubo subtenas la klopodojn de samideanoj en Horní Litvínov por fondi tie novan Lokan grupon.

Děčín. — La urbo invitas viziti ĝin kaj ĝian pentrindan ĉirkaŭaĵon per flugfolio, enhavanta ankaŭ esperantan tekston. Senpage ĝin liveras al interesuloj Propagační a informační kancelář, Děčín IV.

Hradec Králové. — Regulaj klubaj kunvenoj komenciĝis la 8-an de septembro en Adalbertinum kaj okazas ĉiun merkredon je la 20-a horo. La kluba bulteno „Esperanto“ aperis regule komence de Septembro ciklostilata ĉar ministerio de informoj pro ŝpararanĝoj ne permesis plu la paperkvoton. La klubo eldonis Skriban kurson en 12 lecionoj.

Karlovy Vary. — Esperanto-klubo kun Distrikta Kleriga Konsilantaro aranĝis la 21-an de septembro la prelegon de konata vojaĝanto samideano Jos. Pech el Plzeň. La temo de la prelego estis: „Maltrankvila Palestino kaj Egiptujo“ kaj la preleganto montris 200 belegajn kolorigitajn lumbildojn. La salonego de la Banejdomo III estis tute plena. Antaŭ la prelego interesigis la publikon pri Esperanto samideano Dro Fr. Vaněk kaj ankaŭ la vojaĝanto mem bone propagandis Esperanton. — Kurson por komencantoj gvidas Frant. Mílek kaj Ant. Reček de la 28-a de septembro laŭ Kilian-lerolibro. Aliĝis 18 junuloj.

Por dungitoj de la porcelan-fabriko Epiag en Březová apud Karlovy Vary gvidas E-kurson s-ano Rudolf Kolář.

Košice. — Nova kurso por 50 gejunuloj komenciĝis la 5-an de aprilo gvid. de A. D. Kremer. La 14. IV. Zamenhof-memorifesto.

Kraslice. — Loka grupo de la Asocio estis aprobita la 19. II. 1948 de ZNV. Aliĝu ĉe Fr. Černý, Kraslice, Francouzská 1385.

Lanškroun. — Loka grupo de la Asocio estis aprobita la 19. II. 1948 de ZNV. Aliĝojn akceptas Josef Ryšavý, Lanškroun, pošt. schránka 42.

Liberec. — La klubo kunvenas regule ĉiun mardon je la 19,30 h. en klubejo en la Zadní-str. n-ro 1. Kurso por komencantoj okazis la 17. II.—22. V., kiam ĝi finiĝis per kursfina festo en restoracio Bludiště. La semajna rubriko en Stráž severu gvidata de Ing. K. Fanta (en Liberec III, Na bojišti 14), regule aperas tre bone redaktata. Tiu ĉi ĵurnalo publikigis la 20. IV. raporton pri nia kongreso, verkitan de ĝia ĉeestinta redaktoro.

Mladá Boleslav. — Post finiĝo de la kurso (1. III.—19. V. 1948) en la Entreprena Labor-lernejo fondiĝis klubo de sindikataloj-esperantistoj, kiu kunlaboras intime kun la loka klubo.

Nové Mesto n. Váhom. — La 31-an de julio kaj 1-an de aŭgusto okazis tie kunveno de esperantistoj de la distrikto. La laborkunsidon prezidis V. Lamačka el Trenčín. Turista organizo Slovakotour raportis pri sukcesa propagando (600 alvenintaj demandoj) per esp. prospekto de Trenčín.

Olomouc. — La 26-an de majo finiĝis E-kurso en Dobrovský-Altlernejo Popola. Junularo de la E-klubo, gvidata de Mottel kaj Pleva, kunvenas ĉiun merkredon je la 18-a h. en Studenta hejmo. Krom en la regulaj kunvenoj klubaj ĉiujnunde kunvenas la membroj depost 11-a de majo ĉiun merkredon je la 18-a h. ĉe la E-memorŝtono en urba parko. Komitataj kunvenoj 27. V., 24. VI., 29. VII., depost 19. VIII. denove dusemajne. En urbaj tramoj kaj aŭtobusoj brilas reklamilo, metita de la loka E-klubo: Verda stelo kaj konforma alvoko invitas al lerno de nia lingvo.

Opava. — La kurso, pri kiu ni raportis sur p. 59, alportis rezulton rimarkindan. Jam estas fondita nia Loka grupo, la statuto estas por aprobo ĉe ZNV kaj la komitato viglas. Aliĝis jam pli ol 30 membroj kaj novaj anoj sin daŭre anoncas. Por aŭtuno estas anoncita nova kurso, por kiu aliĝojn akceptas Loka Kleriga Konsilantaro. La nova klubo aperigis ciklostilitan varban cirkuleron el 15-a de aŭgusto kaj invitolon por kursoj, kiuj komencis la 1-an de oktobro. Sekretario de la klubo estas s-o Ota Erban, kapitano de ĉs. armeo (Lenin-strato 27).

Ostrava. — Kunveno sur Cantorio 1948: Esperanto-klubo Ostrava I. klopodis renoviĝi iam tradiciajn kunvenojn de esperantistoj sur monto Cantorio. Tial ĝi kunvokis unuan postmilitan kunvenon tien la 20-an de junio. Ni povis konvinkiĝi, ke nia ideo havas oferemajn batalantojn. Cantorio estas monto en Silezia Beskidmontaro, proksimume 900 m alta kaj ĝia supro estas dividita per ŝtata limo ĉeĥoslovaka-pola, kaj el Bystrice n. O., kie finas fervojo, ĝi estas atingebla post 4 horoj de piedmarŝo. Dum la tuta tago pluis tre antipatie. Kaj tamen estis sub monto pli ol 50 gesamideanoj el Ostrava kaj ĉirkaŭaĵo, Kunčice p. Ondř., Bohumín, Stonava, Podolie, Rifuĝej-domon sur supro de monto atingis 45 homoj. Estis inter ili 68-jara s-ano Mlýnek el Zábřeh kaj 10-jara Trombala el Bohumín. Ĉar ne estis eble kunveni en libera naturo pro pluvo kaj densa nebulo kaj rifuĝejo estis plen-plena, komencis ĉiuj post refreŝiĝo reenmarŝi. Malsupre en Nýdek okazis mallonga kunveno, dum kiu s-o Slaný tralegis protokolon de lasta kunveno sur Cantorio antaŭ 10 jaroj. Parolis plue Janouš el Ostrava, Zanáška el Koprivnice, Bubik el Stonava, Kermel el Bohumín. Ĉiuj konsentis, ke ekskursoj al Cantorio okazu ĉiujare junio dum kiu ajn vetero. Dum la tuta vojaĝo tien kaj reen zorgis pri bona humoro gefratoj Hojdys kaj s-o Vajdik. S-o Bubik el Stonava surfirmadis dumvoje transparentojn kun surskribo: „Lernu Esperanton!“ en ĉefia kaj pola lingvo. Esperanto-klubo Ostrava I eldonis al tiu

tago malgrandan ciklostilitan gazeton „Verda stelo super Cantorio“, kie proklamis konkurson por partoprenantoj. Premion gajnis s-o Arnošt Hojdy pro poemo, per kiu li humore priskribis tutan entreprenon. En memorlibron skribis partoprenantoj gajajn rimarkojn kaj versojn. La pluva, sed gaja, kuraga kaj impresriĉa tago firmigis nian decidon: Plue kaj pli bone labori por nia Esperanto. (Janouš)

Ostrava-Zábřeh. — En burĝa lernejo Ostrava-Zábřeh-Družstvo instruis en E-kurso Alois Kubala 40 lernantojn de tiu lernejo. Enkonduka parolado estis la 18-an de januaro, la kurso finiĝis la 9-an de junio. Estis ekzercata ankaŭ esperanta korespondado kaj la geknaboj lernis kanti 6 esperantajn kantojn. Dek partoprenintoj anoncis sin al ekzameno. Direktoro de burĝa lernejo Buček, kiu kontrolis la kurson en nomo de Landa Lerneja Konsilantaro, esprimis sian plenan kontenton kaj promesis daŭre subteni nian aferon. — 16. V. propagandcela ekskurso al Horní Lhota, distrikto Bilovec, varbita tiea grupo de Svaz české mládeže (Asocio de ĉeĥa junularo). La 27. V. festa kunveno por honorigi la 64-an naskiĝtagon de respublika prezidento Dro Beneš. Partoprenis fama infana ĥoro Hrabůvští zpěváci kun sia estro Ladislav Kulinský, muzikis membroj klubaj sam-ino Anna Hrbáčová, Frant. Basl kaj aliaj, inter ili ankaŭ junaj lernantoj, recitis plej juna membrino Věruška Weisová.

Podmokly. — En la fervoja lokomotivhejtejo granda propaganda kesto kun varba materialo. Montriĝas forta aktiveco inter lokaj esperantistoj-fervojistoj.

Praha. — Post la Sokol-kongreso pendis en la urbo dum 7—10 semajnoj multaj afiŝoj ĉeĥ- kaj esperantlingvaj kun teksto: „Esperanto — internacia lingvo — ligas naciojn de la tuta mondo — servas al paco.“ Pendigis ilin E. Klubo en Praha.

Tábor. — La klubo kunvenas nun ĉiun lundon. En la kluba familio estas ankaŭ studentoj de ambaŭ gimnazioj kaj el komerca lernejo. Gimnazia direktoro Laška iniciatis, ke gimnazioj pretigu por Majfesta procesio alegorian veturilon poresperantan. Dagmar Brožová tuj disponigis necesan monon kaj Květa Dušáková desegnis bildeton de proponata propagando, Vladimír Havlíček efektiviĝis la ideon. Finan formon donis al la tuto pentristo Francisko Knotek, kiu stampis la devizon: „Nacio volas unuecon, Esperanto volas unuecon de nacioj“. Antonín Pokorný skribis la ŝurskribon kaj nomojn de diversaj

landoj. La globuson kaj super ĝi la stelon faris kaj pentris Tůma. En komerca akademio estis kurso, gvidata de profesoro Inĝ. Šhánělec, en gimnazioj estis fine de Majo finitaj kvar kursoj. Gvidis ilin F. Knotek, D. Zeman, E. Jokl, J. Vyčichl (Vičihl). Specialaĵo estas certe, ke Vyčichl finis la kurson kun la sama nombro da ĉeestantoj, kun kiu li la kurson komencis, t. e. 32. Al ĉiuj kursanoj oni rekomendis aboni nian revuon „Esperantista“. Al ĉiuj kursgvidantoj entute ni konsilas fari la samon. Tiel ni retenos la intereson iam vekitan kaj la lernintoj fariĝas tiel membroj de la movado. Ĉiunonate alvenas en la domon rememoriganto kaj sentrude ofertas avantaĝojn de universala lingvo. La nova adepto de nia koncepto ekscias pri niaj progresoj en la mondo kaj estas informata pri stato de nia afero en nia lando. Se ni ne zorgas sufiĉe energie, ke niaj kursoj estu enigataj en nian movadon, ni ne plenumis nian taskon. La kursoj finiĝas, la homoj disiras kaj ofte estas ankaŭ fino de la intereso, kaj restas nur rememoroj. Tio al ni ne sufiĉas. Tuj ĉe la komenco de instruado estu nia ĉefa zorgo, kiel fari el kursanoj aktivajn esperantistojn. Plej bona rimedo estas akiri ilin por abono de niaj Esperantaj gazetoj kaj kompreneble antaŭ ĉio, ke ili ricevadu nian propran revuon, kiu ja servas al propagando de Esperanto kaj evitas ĉion, kio povus esperantistojn ĥaosigi. — Regiona peranto estas (anstataŭ forloĝiginta Inĝ. Krajíc) s-o Frant. Knotek, Jeronýmova 1042. — Adreso de la Klubo: Dr Hugo Jokl, Vančurova 1813. (Prof. Dr Hugo Jokl)

Teplice. — Sur bazo de aprobita statuto estas preparata fondo de Esperantista klubo - Loka grupo de EAĈSR. La prepara komitato serĉas kontakton kun samideanoj en Teplice kaj plej proksima ĉirkaŭaĵo. Ili sin anoncu al O. Sklenčka, Živnostenská banka, telefono 2241. Regulaj klubaj kunvenoj ĉiulunde je la 20-a h. en kafejo Na vyhlídce, angulo de la stratoj Leninova kaj Krupská.

Trenčín. — Loka grupo de „Slovakotour“, oficiala organizo de turismo en Slovakio, eldonis ilustritajn kartojn de la urbo kun teksto en la slovaka kaj Esperanto. Ape- ris 5 specoj, pluj sekvos.

Turnov. — Unuamajan manifestacion ĉeestis 35 gesamideanoj sub E-standardo. — Kursfina festo okazis la 22-an de majo en Sokol-restoracio. La 23-an de majo ekskurso en Bohemian Paradizon.

Žamberk. — Instruistino Růžena Marešová gvidis E-kurson kun 30 lernantinoj. Ili korespondas jam kun pluraj landoj.

RICEVITAJ LIBROJ

Malá učebnice esperanta. Slovníček esperantsko-český. Druhé vydání. Pro mládež napsala Julie Šupichová. 1948. Nakladatel Svatopluk Hrnčíř, knihkupec v Nymburce. 88 paĝoj 10×14 cm, 18 Kčs. — Dua eldono de lernolibreto por infanoj, kies unuan eldonon la aŭtorino aperigis en 1924, ĝojigos ĉiujn amikojn de nia movado. La gramatiko estas konciza, sed kompleta, da tekstoj por ekzercado estas iom pli ol en la unua eldono, la vortareto esperanto-ĉeĥa enhavas precipe vortojn uzitajn en la libreto. La tipografia aranĝo estas ankaŭ bela, do estas tre versimile, ke la lernolibreto plaĉos al infanoj, por kiuj ĝi estas destinita. Estas agrable konstati, ke nombro de disponeblaj lernolibroj por ĉeĥoj kreskas.

Malý slovník esperantsko-slovenský a slovensko-esperantský. Sostavil J. V. Dolinský. 1948. Vydal Slovenský esperantský ústav v Turč. Sv. Martine. Paĝoj 212, 12×15 cm. Prezo 60 Kčs. — Temas pri grava eldonaĵo. Esperanta-slovaka vortareto havas 71 paĝojn, la slovaka-esperanta 120 paĝojn kaj enhavas relative multajn, iam sufiĉe maloftajn, vortojn slovakajn tradukitajn. Kelkajn el ili oni ne trovas ĝis nun en ĉeĥa-esperantaj vortaroj. Precipe utila estas ekz. enmeto de slovakaj bibliaj prapraj nomoj. Kiel neĝusta mi trovis „karanteno“, devas esti „kvaranteno“. Iam estas kunmetitaj vortoj faritaj tro arbitre, ekz. „cúvať“ ne povas esti „dorsiri“, eble: „dorseniri“ aŭ „reen iri“, „returnen paŝi“, „retropaŝi“. Oni

uzas iam en literaturo „dorsire“, sed ĝi ŝajnas ne tro komprenebla eĉ en tiu adverba formo. La elekto de vortoj en la ambaŭ vortaroj estas tre traŭa, precipe mi laŭdus la esp.-slovakajn, en la dua ŝajnas sufiĉe multaj vortoj neoftaj dum kelkaj oftaj mankas. Sed estas mal-facile trovi normon. Ambaŭ vortaroj estas verkoj merit- antaj tre atentan foliumadon kaj estos tre utilaj ne sole por slovakoj sed ankaŭ por ĉeĥoj. La aŭtoro efektive klopodis, ke li kompilu vortaron efektive novan, provante enmeti vortojn ne ĉiam trovatajn kaj li vidigis penetremon kaj talenton vortaristajn, kiujn oni ne renkontas ĉiam. Lia verko meritas rekomendon tre sinceran.

Th. Kilian: Esperanto. Učebnice a čítanka. VI. vydání, 20.—25. tisíc. V Brně 1948. Knihotiskárna a nakladatelství Pokorný a spol. v Brně. 112 paĝoj 13×20 cm. Prezo 39 Kčs. — Sesa eldono de la konata Kilian-lernolibro kun la fama legolibro „La mondo rakontas“ kaj kun ambaŭ vortaretoj. La fakto, ke post iom pli ol unu jaro la kvina eldono estis disvendita, estas pruvo de taŭgeco de la lernolibro. La vortaretoj, presitaj per malgrandaj, tre bone legeblaj tipoj, bone sufiĉas por komencanto, tial la libro faras unu tre utilan tutaĵon. La legolibro (36 paĝoj) meritas ĉiam apartan mencion, ĉar ĝi enhavas 50 rakontojn tre diversemajn el efektive ĉiuj partoj de la mondo. — Ni ĝojas, ke tiu lernolibro estas denove havebla.

Vychází měsíčně (10krát do roka). Majitel, vydavatel a nakladatel Svaz esperantistů ČSR v Praze XIX/14, p. schr. 75. Odpovědný zá- stupce listu Dr Stan. Kamarýt. Ročně 70 Kčs s členstvím. Bez členství 80 Kčs. Účet pošt. spoř. 9.602. Tiskne «Čik» v Karl. Varech. Účet na poštovní noviny s povolená red. pošt v Praze č. j. 1A-Gr-2372 OB-48. Dohledací poštovní úřad Praha 25.